

PENSEO

N-ro 283

majo / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



SANTA LA ROZARIO

fajrmeto, murdo, rabo kaj malversacio,
priŝtelo, seksatenco, koruptiĝo, bohemio...
ĝuante ĉiujn pekojn en ĉi tiu mondo brua,
mi estas sankta kaj kvieta kun la rozario.



2012.11.14 - 8

estas tro malfrue

starante en la tombo de mi mem fosita,
vidas mi la nifan eteskalatoron.
ĉirkaŭite de realaj vojoj, la piedoj,
blindaj sed sangvinaj, jam ne havas plu
motoron.

2012.11.15

ho, maŝino!

fora maskito volis kun mi amikiĝi.
plurfoje ĝin rifuzis mi ĉar ne videblis ĝia
sino.
en la reto ŝatas mi babili nur kun ino.
fine ĝi elmontris sian subon. vere, ina, ho,
maŝino!



2012.11.16 - 23

sen vento

sen vento, mi ekĉasas lumon
sur la orbito for de aero sufoka.
trinkante mian propran lakton,
mi artefaras pluvon por la ĉielarko.

2012.11.17 - 2

Mori (Usono)



AFORISMe(4)

Kiu havas pacon
en la koro,
vivas pace
kun l' najbaro!

Al malkontentuloj
eĉ en l' palaco
mankas la sento de
ĝojo kaj paco!

Estu
unu el la grandaj saĝuloj,
kiuj fojfoje sinrigardas
tra alies okuloj!

Ho viro,
Ne ĉiu virino
meritas vian amon,
Ho virino,
ne ĉiu viro
meritas vian larmon.

Ne ĉiu bela
estas afabla,

sed ĉiu afabla
estas bela.

Nur
tiu homo la mondon
plibonigas
kiu daŭre siajn mankojn
duonigas!

Unu , du saĝaj ,
konsciaj poetoj
pli faras ol
Miloj da patriotoj.

Poemo
elverŝita el la koro
estas eterne nova
kiel freŝa floro.

Kiu serĉadas feliĉon
sur la tero,
fiaskas ĝis li vidas
feliĉon en sia koro!

Vivo
sen espero
estas infero!

Amo
estas malsano bela,
sed fatala!

Cezar (Germanujo)



Transloĝinte

(por eksplodema esperantistino)

I

Vivi elskatole
kaj ne libervole,
inter multaj pakoj
kaj tre grandaj sakoj.

Lito, nova, restas,
kion ŝi tuj testas.
Nuda ŝi englitas,
sed al tentoj spitas.

Inter sak' kaj pako,
mankas varma jako.
Vivo elskatole,
eĉ senalkohole.

Vivo do sen viro,
sen konsola diro?
Ĉu ŝi lin forlasis,
ĉu la amo pasis?

Eble edz' ne rolas,
ĉar ŝi inon volas.
Mi ne povas scii
kaj ne emas fii.

II

Se humur' ne mankus,
ŝi pri l' versoj dankus.
Sed ŝi tuj ekkrias,
ke poetoj fias.



Ĉaplino en Parizo

Kara mimo en Parizo,
Chaplin sur la strato,
mi por vi poemon skribas
kiel via frato.

Mi pri vi nenion scias,
eĉ ne aŭdas vorton,
sed amiko, mi admiras
vin kaj vian forton.

Homo rara vi ja estas,


pantomima grando,
kun melono sur la kapo
belo de la lando.

Via mondolingvo gesta,
via palpebrumo,
montras, ke la homo estas
pli ol nur kostumo.

Kiel vi la kisojn ĵetas
en pariza parko,
tio estas majstroverko
ne de iu ŝarko.

Tio estas ja mesaĝo
el pli bona mondo,
mi vin dankas, kamarado,
tramp' kaj vagabondo.

Restu forta, mi deziras,
kontraŭ sentdetruo,
per silentseren' elkore,
meze de la bruo.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Destino

Kiom da tavoloj
de jarcentoj
min konstruis?

Ene de mi
la stranga animo:
foje mara
foje arbora
aŭ granda monto.

Mia penso
ventas
silentas
babelas...

Kiom da memoj
staras ĉe l' anguloj
de l' mondo?

Mi replikiĝas, dividiĝas;
mi trapasas min
ĝis sukcesi aŭdi
tiun formikon,
kiu la sorton plenumas
sed tion ne scias.

Juiz de Fora, 10/03/2015.

Paŭlo Silas (Brazilo)



SENFINA KONFORMIĜO

Psiko pasinta svenas ĉimomente.
Intaj ligiloj havis ĝi tro da.
Provas viviĝi nova sistem' de
Penso sen mensa nodo malnovmoda.

Falo fatala staras evidente.
Fini fiksitan formon kun klopod' al
Vek' de l' pli pova prava hompretend' el
Ĉiuj celantaj ŝanĝon periodan.

Voĉoj alternas orde, harmonie;
Tamen ankoraŭ laŭte, plorokrie,
Utopiec' alvokas la perfekton;

Volas nuligi dubon kaj malcerton,
Fari fekunde viva ĉiun tagon
L' ekspluatitan akvomankan agron.



TRANSVIVA SONO

Pensklarigan, kantsimilan sonon
Orelkonko kaptis facilpove.
Muziknotoj kreis sin sinmove.
Ĉu ellasis la Transviv' fantomon?

Kion ĝi, per kant', intencas montri?
Tion ĉi mi malkapablas sondi.
Ĉu respondon al problemo donos?
Ĉu deĉifro ankaŭ same sonos?

Aŭdsentumo sentas ion malsimilan,
Ion plian ol adiaŭdiran.
Ne komprenos la timpan' eĉ se ĝi sangus.

Se deĉifr' almenaŭ nun ne mankus,
Plasmfarita spektro povus alparoli.
Ĉu vi aŭdas kantsimile plu sonori?



Siv Burell (Svedio)



En la fabelo La arbaro

En la arbaroj fabelaj
vi strangajn estaĵojn ekkonas,
parolas al troloj malhelaj
kaj en helaj briloj dronas.

La lupo kantas kaj kuras,
rivero lirlas melodion,
leporo sincere tamburas
pensante pri tute nenion.



Pentraĵo de la aŭtorino

En fungoj multaj estaĵoj restas,
vi certe iun vekis per viaj paŝoj
kaj se vi ne tro elektema estas,
vi gustumu fungodolĉaĵojn.

Se adoltoj diras,
ke ĉio estas blag',
vi diru, ke vi miras,
ke al ili mankas la imag'.

Se vi senantaŭjuĝa estas,
multe pli vi spertas, mi vin asertas.

Jacques Brel (1929-1978)



Vi ne iru for

(kantteksto)

Vi ne iru for
Ĉio en forges'
Jam finiĝu jes
Ja venis la hor'
Ke nekonsekvenc'
Sensencu al ni
Ke nun tie-ĉi
Estu rekomenc'
Ni ne lasu plu
Ke pro bagatel'
Mortu en malhel'
La ĝojo de du
Vi ne iru for [3 foje]

Perloj jen promes'
Falos en diluv'

Al vi eĉ se pluv'
 Iĝis nur memor'
 Ne gravas, al glor'
 Via, mi ĝis fin'
 Zorgos kovri vin'
 El tutmonda or'
 Kaj do en novland'
 Am' estos la reĝ'
 Am' estos la leĝ'
 Sub via komand'
 Vi ne iru for [3 foje]

Vi ne iru for
 El mia torent'
 Sensencvorta vi
 Vidos ke fervor'
 Nur estas en ĝi
 Versoj pri ador'
 De koro al kor'
 Pri amorfuri'
 Kaj vi scios pri
 Ĉi mortinta reĝ'
 Kiun amsieĝ'
 Separis de vi
 Vi ne iru for [3 foje]
 Ĉu ne estu mir'
 Ke vulkana flam'
 Reas kun delir'
 Spit' al aĝfifam'
 Kaj ke kun unik'
 Bruliĝinta grund'
 Special-abund'
 Iĝas al tritik'
 Kaj ke noktoven'
 Ne krepuskas sen
 Ruĝ' kaj nigro en
 Kuniĝa solen' ?
 Vi ne iru for [3 foje]

Vi ne iru for
 Tutĉesu parol'
 Ĉi plor' sen konsol'
 En granda ignor'
 Sufiĉu al mi

Vi laŭ dancoĝu'
 Laŭ konversaci'
 Plene sen enu'
 Mi senskue plu
 L' ombr' de via ombr'
 L' ombr' de via man'
 De via kalkan'
 Vi ne iru for

Esperantigis



Uel Roŝa (Brazilo)

Ali Podrimja (1942-2013)



**Pluvas en
 ĉi tiu legendo**

Kiam mi ĵetas ŝtonon en riveron
 febro silenton detruas

kiam mi aŭdigas malnovan kanton
 maldormo silenton disrompas

kiam mi serĉas min en ludo
 kapdoloro silenton turmentas

kaj pluvas senĉese pluvas
 en ĉi tiu legemdo



La komenco dekomence

En la fino la neKonata fermos la Pordon

Post nia dorso iras Daniel Defoe nia malnova
 amiko

Robinsonon Kruso li serĉas
tiun grandan malkovrinton de la homa soleco.

(tiom da jarcentoj pasis de kiam ĉi tiu Pordo
estas malfermita)

En la fino mi aŭdas pezan danco-ritmon
seruro-grincon spiron plantojn sur la muro
ĉu nia ŝlosilo rustiĝis aŭ la sorto nin lasis al ni
Ho kiel ne eblas nia savo de ekster la ludo

Dumvenio*

Vi estis morta
Nun mi ĉiam vidas vin morta

Senfunda betono glacia teruro
rustaj aŭtomobiloj mortaĉantaj hundoj

Diversaj sonĝoj kiel Elipsoj

Sur vian potdon (pordon) ne estis por mi
destinite frapi
Kaj vi ne trinkigis min almenaŭ per akvoguto

nek malfermeti fenestron

En sonĝoj ni renkontiĝos post kelkaj jarcentoj
kelkajn vortojn ni interŝanĝos pri la ekzisto de
beleco

Betono aŭtomobiloj mortaĉantaj hundoj
dramludo en la komplika spaco

Vi estis morta
Nun ĉiam mi vidas vin morta

**La malnova ilira loĝkolonio proksime al la hodiaŭa
Pejë (Kosovo)*

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUA

La egaleco de ĉiuj estaĵoj

§02-12

Iam la reĝo Yao demandis sian ministron Shun: “Mi volus ataki la regnojn Zong, Kuai kaj Xu’ao. Ĉiun tagon, kiam mi sidas sur la trono, mi sentas mian koron ŝarĝita de tiu ĉi afero. Kial do estas tiel?”

“La regantoj de tiuj ĉi tri regnoj,” respondis Shun, “vivas ankoraŭ primitive inter artemizioj kaj veproj. Kial do vi sentas vian koron ŝarĝita de la afero? En la antikveco foje dek sunoj kune aperis kaj ĉio en la mondo estis prilumata de ili. Nun, kiel multe pli hele lumiga estas via virto, kies brilo superas tiun de la sunoj!”

§02-13

Nie Que demandis Wang Yi, dirante: “Ĉu vi scias, kio estas la kriterio komuna al ĉiuj aferoj?”

“Kiel mi povus scii?” respondis Wang Yi.

“Ĉu vi scias tion, kion vi ne scias?” redemandis Nie Que.

“Kiel mi povus scii?” respondis Wang Yi.

“Do, ĉu ĉiuj aferoj estas nescieblaj?” demandis Nie Que triafoje.

“Kiel mi povus scii?” respondis Wang Yi.

“Sed, malgraŭe, mi provos ion diri. Kiel do mi povas scii ke tio, pri kio mi diras ke mi scias,

ne povas esti efektive tio, kion mi ne scias? Kiel do mi povas scii ke tio, pri kio mi diras ke mi ne scias, ne povas esti efektive tio, kion mi scias?”

“Nu, permesu al mi meti al vi demandojn. Se la homo dormas en humida loko, li povas havi doloron en siaj lumboj, kaj duono de lia korpo povas esti kvazaŭ mortinta. Sed ĉu tio povus okazi al la misgurno? Se la homo loĝas en alta arbo, li povas esti timoplena kaj tremi per la tuta korpo. Sed ĉu tio povus okazi al la simio? El la homo, la misgurno kaj la simio, kiu do scias, kia loĝejo estas la plej taŭga? La homo manĝas viandon; la cervo sin nutras per herboj; la skolopendro frandas etajn serpentojn; la strigo ĝuas musojn kiel delikatan manĝaĵon. El la homo, la cervo, la skolopendro kaj la strigo, kiu do scias, kia gusto estas la plej bona? La simio hundokapa pariĝas kun simiino nehundokapa; la elafuro kun cervino; la misgurno kun fiŝo. Mao Qiang kaj Li Ji estis rigardataj kiel la plej belaj el la virinoj; sed ĉe la vido de ili fiŝoj profundigis en la akvo, birdoj alten flugis en la aero, elafuroj kaj cervoj rapide forkuris. El la homo, la fiŝo, la birdo kaj la cervo, kiu do scias, kia estas la plej ĝusta normo de beleco? Laŭ mi la principoj de la humaneco kaj la justeco, la vojoj de pravo kaj malpravo implike intermiksiĝas kaj konfuziĝas. Kiel do mi povus fari la distingon inter ili?”

“Se vi,” demandis Nie Que, “ne scias, kio estas utila kaj kio estas malutila, ĉu do tio ne signifas, ke ankaŭ la perfekta homo estas en tia nesciado?”

“La perfekta homo estas mistera,” respondis Wang Yi. “Se la grandaj lagoj borus, la varmon li ne sentus. Se la grandaj riveroj glaciigis, la malvarmon li ne sentus. Se la montoj estus fenditaj de tondroj, aŭ la maroj estus kirlitaj de ŝtormo, li ne timiĝus. Estante tia, li suprenirus al la nuboj en la ĉielo, rajdus sur la suno kaj la luno kaj tiel migrus libere trans la maroj. Lin povas tuŝi nek la morto,

nek la vivo, por ne paroli pri la konsidero pri la utilo kaj malutilo.”



Elĉinigiŝ



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Fieraĉa rano

ĉina antikva fablo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La rano
vivadas kun ĝu'
en malprofunda puto
libere kaj ĝoje, nu,
sen ajna enu'.

Kun ĝojo
li ekster puto
amuzas sin saltadi
kantas kvake sen mutito
en sia ludo.

Kiam li
ludas ĝis laco,
li revenas en puton
por ripozi en paco

en eta spaco.

Sin banas
li kun freŝa sent'
en varma puta akvo
sen ĝeno de forta vent'
je ega kontent'.

Li kuŝas
sur mola kotŝlim'
kvazaŭ sur lanuga lit'.
Kiel la hejma intim'
sen ajna deprim'!



ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Li pensas:
mi estas sola
plej feliĉa en la mond',
vivas senĝene fola
kaj libervola.

Renkontas
li iafoje
maran grandan testudon
kiu iras survoje,
li diras ĝoje:

“Kara vi,
venu al loĝej'
mia por ĝue vidi.
Ĝi estas komforta l' plej,
bela domo, ej!”

La testud'
laŭ lia invit'
volas eniri la puton,

sed enŝovas sin per glit'
jen vane kun ŝvit'.

Senhelpe
pro granda maso
li rezignas inviton
haltas en embaraso
pro ne trapaso.

La testud'
rakontas al li,
kiel la mar' aspektas,
kiel vaste kuŝas ĝi
kun forta magi'.

Profundas
ĝi sen mezuro,
tre multaj fiŝoj naĝas
tie en akva puro
jen kun plezuro.

Influas
ĝin nek inundo
nek grunda trosekego,
sin tenas per profundo
akva abundo.

Feliĉe
ni vivas vere
en vasta oceano
senĝene kaj libere
tute fiere.

Aŭdinte
ja tion la ran'
sentas grandan hontemon.
Pli vastas ja l' ocean'
ol sia kaban'.

Ba, l' rano
scias nurnure
pri sia eta spaco
ne pri l' maro nature,
vee murmure.

Zhao Jianping (Ĉinujo)



Venturo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 Perfide,
 flora mielo
 sopiron ombre tondas.
 Vent' blovas kontraŭ velo –
 frosta anhelo.



Plaĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 Sableroj
 fajnaj dezerton
 englutis. Steloj supre
 haltigis jam koncerton
 por gajni sperton.



Melankolio

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 Larmgutoj
 falas sen fino,
 odoras harmonie.
 Kor' sagas al ruino
 de falskulmino.

Nego

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 Sin sternas
 flokoj arĝentaj
 flirtfale; folas knaboj
 blankharaj en silentaj
 suspiroj ventaj.



Sentitole

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
 aprile
 naivaj floroj
 nin hantas jam obstine;
 kie audighas ploroj?
 jen korangoroj!

Jadranka Miric (Serbujo)



Mirinda amparo

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*
 Milito
 forprenas amon.
 Dispartigas amikojn.
 Glorigas fi-proponon
 donas fi-samon.

Similaj
 trovas sin
 en diversa ĉirkaŭaĵ'
 eĉ en fi-diabla sin'
 por apogi sin.

Kontraŭe
 amo lumigas
 homon intere milde,

vigle vin revivigas.,
vin perfektigas.

Julia,
Ismiĉ Admira
kaj Boŝko Brkiĉ, fama
paro, pro amo mira.
Amo Admira!

Ilia
peko estis am'
dum aliaj militis.
Ilin mortigis pro am'.
Sennacia am'.



La poemo estis dediĉita al la "sarajeva Romeo kaj Julia" al serbo Boŝko Brkiĉ kaj muzulmanino Admira Ismiĉ loĝantaj en BiH kiuj provis fuĝi de snajpera pafilo.

*Ilian longjaran amon mortigis /1993/ tiuj kiuj forgesis la vorton
– Amo*

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Zhuang Qixion (Ĉinujo)



Klaro kaj Brilo*

—laŭ ĉinesko Langtaosha**

Larmas mia kor'
ĉe tomb', ĉu or'?'
Fantom' en pluv' kun dolor'
penlaboris pro justo
en ĉiu hor'.

Tomb' prez-altas por
la cindr-memor'.
Sub arbar', herbej' kun glori',
al nova mondo en akvo,

ĉu sanga plor'?

2015-4-5

**Langtaosha (Ondo lavas sablojn): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)*

Floro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Flor'
ne velku en bela hor'.
Vin montru
En bunta kolor'!

Teo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Te'
gustas bone kun ide'
kultura
de longa pase'.

Liro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Lir'
melodias per sopir'.
Ne homo
eĥas per admir'.

**Dekses-Silabo (ĉine: Shiliuziling): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Igorj Ĥomjakov (Rusio)



Edzino

Kiam mi konatiĝis kun mia estonta edzino Julia, niaj rilatoj evoluis tre tempeste. Jam post semajno de nia konatiĝo ni loĝis kune. Ambaŭ ni havis farton de eŭforio.

Foje ni promenis laŭ vendejoj, kaj mi ekvidis tre belan kruĉeton kun afrika pejzaĝo sur ĝi. Mi ĝin tuj aĉetis. Kaj en sekva tago,

kiam Julia estis en laborejo, mi decidis, ke mi devis aĉeti ankoraŭ saman kruĉeton por ŝi.

Kiam Julia revenis, mi decidis ŝerci. En koridoro mi parolas al ŝi:

– Julia, mi volas rakonti al ŝi, ke virusoj estas unikaj estaĵoj. Ekster vivaj organismoj ili ne havas ecojn de viva estaĵo. Nur kiam ili situas en viva organismo, ili povas kreski kaj reproduktiĝi. Sciencistoj ĝis nun disputas: al kia naturo ili devas rilati virusojn – al viva naturo aŭ al ne viva naturo? Imagu, kiel tio interesa: tio signifas, ke ne vivaj estaĵoj ankaŭ povas reproduktiĝi. Kaj jen rigardu.

Mi kondukas ŝin al kuirejo kaj montras al breto, kie staras du egalaj kruĉetoj:

– Imagu, matene mi vekigis, kaj ili jam estas du! Dum nokto ili reproduktiĝis!

Antaŭnelonge mi rememoris tiun eventon, kaj edzino parolas:

– Mi tiam havis tian farton, ke mi preskaŭ kredis vin.

Mia edzino laŭ okcidenta horoskopo estas Leono, kaj mi laŭ orienta horoskopo estas Tigro. En tiu tempo mi laborenspezis pli malmulte ol Julia. Foje mia patrino diskutante tiun situacion ridige misparolis:

– Tio estas laŭnorma. Jen ekzemple en naturo por tigroj leoninoj ĉasas!

Mi tre timas tikladon. Kiam Julia ludante mordas min, mi krias per histeria voĉo:

– Helpu! Helpu! Leoninoj! Leoninoj!

Mi estas artisto-ceramikisto, vendas miajn ceramikajn ludilojn en bazaro.

Foje Julia vizitis min dum vendo. Ŝi tre kompatis min, ke mi staras dum malvarmo kaj ne havas aĉetantojn.

Jen kion ni elpensis por ke plimultigi enspezon.

Kiam neniu vidis, mi donis al edzino monon, kaj ŝi afektante aĉetantinon aliras al vendotablo kaj aĉetis ludilon. Vidante tion aliris aliaj aĉetantoj. Starinte nemulte antaŭ vendotablo Julia parolis:

– Donu al mi ankoraŭ du ludilojn.

Tuj vendo ekvigligis, homamaso apud vendotablo iĝis pli multe, kaj enspezo rezultis tre bonan.

Julia ŝatas mokimiti min. Iufoje ĉe ŝi tio iĝas tre ridige kaj simile.

Foje vespere ni kantis kantojn per karaokeo. Mi tre ŝatas patriotajn kantojn. Tiam mi drinkis multe bieron, tial mi kantis laŭte kaj esprimplene.

Kaj matene Julia mokimitis min:

– Rrrrruĝa arrrrrmeo as plej forrrrrta!

Ni loĝas en granda multeloĝeja domo en kvina etaĝo.

Tio okazis somere. Foje lunde mi ekaŭdis el fenestro lamentan miaŭadon:

– Miaŭ! Miaŭ! Miaŭ!

Miaŭado apenaŭ ne ĉesis, nur silentiĝis dum mallonga tempo. Ial al mi ŝajnis, ke katido miaŭas en balkono de iu, iu forveturis en somereloĝejon kaj lasis ĝin en fermata balkono.

Katido miaŭais dum tuta nokto kaj dum tuta mardo. Mia koro doloris, mi pensis: kiuj sadistoj lasis katidon en fermita balkono!

Merkrede mi por tuta tago forveturis el urbon. Kiam mi revenis vespere, mi ree aŭdis lamentan miaŭadon. Nokte inter merkredo kaj ĵaŭdo tre pluvegis, sed katido ne silentiĝis. Nokte mi eliris kun lanterno sub balkonojn por ke kompreni, de tie atingis miaŭado, sed mi ne povis trovi ĝin.

Matene mi eliris sur balkonon. Pluvego daŭris. Kaj subite najbarino de apuda balkono parolas:

– Povra katido ie en arbustoj blekas.

Mi decidis: efektive, mi devas revizii arbustaron antaŭ domo. Mi prenis pluvombreton kaj iris serĉi. Mi trovis la katidon laŭ sono en arbustaro. Evidentiĝis, ke ĝi estis tre malgranda, ĝia amplekso estis duono de polmo. Mi alportis ĝin en hejmon, varmigis kaj manĝigis. Ni ne povis lasi ĝin en nia hejmo, ni jam havas virkaton. Dum ĵaŭdo kaj vendredo la katido loĝis en nia hejmo, kaj

